

KONKURSO PRI JUBILEA SIMBOLO

Mondvaste ekzistas amaso da simboloj kaj tuta scienco pri ili estiĝis. Kvankam ili troviĝas ankaŭ en la Esperanto-Movado, ni ja bezonas unu plian, tiun pri nia centjara jubileo.

Jam komenciĝis la agado por festi la jubileon de la Internacia Lingvo en 1987, kiel oni povas legi en la revuo ESPERANTO de pasinta oktobro. Por citi el tiu ĉi, kion ni bezonas nun estas "taŭga simbolo por la festado", kiel simple diras la agadprogramo por la jubileo, aprobita de UEA. Ĝi emfazu nian centjaran historion, la pluvivon kaj daŭran plivastigon de nia komunumo kaj niajn celojn kaj pretecon alfronti duan jarcenton de nia lingvo. La simbolo devas esti presebla "per unu koloro kaj facile komprenebla al la ekstera publiko". UEA nun lanĉas konkurson ĝuste por tia simbolo, en kiu Esperantistoj de kie ajn, ĉu membroj de UEA aŭ ne, rajtas partopreni. Tio subkomprenigas, ke al Esperantisto kiu deziras konkursi, estas permesate peti helpon de ne-esperantista artisto en la desegnado de la simbolo, kaj eĉ rajtas fervorigi grafikiston ne-esperantistan rekte partopreni.

La limdato por la ensendo de la konkursaj simboloj al la Centra Oficejo estas la 31a de Oktobro 1982, do, ĉion konsiderinte, restas ankoraŭ pli malpli tri monatoj por montri viajn artismajn instinktojn. La gajninto pliriĉiĝos en la kvanto de 1 000 nederlandaj guldenoj. La estraro de UEA antaŭ la nuna jarfino aljuĝos la premion. Do, se vi aŭ grafik-sperta amiko volas defii la fortunon kaj/aŭ la ŝancon, vi tute eble havos la plezuron vidi vian kreaĵon dum kelkaj jaroj uzata surleterpaperoj, en presaĵoj, ktp., ne nur de UEA sed ankaŭ de multaj aliaj Esperanto-organizaĵoj.

Petu pliajn informojn kaj detalojn ĉe la Centra Oficejo de UEA - sed ne prokrastu.

* * *

SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

P. O. BOX 1227, Cape Town.

PREZIDENTO: S-ro E. de Kock.
VIC-PREZIDENTO: S-ro A. von Blottnitz.
SEKRETARIO: S-ro O. Sher.
KASISTO: S-ro C.S. Beckford.
KOMITATANOJ: S-ino A. Fouché, s-roj H.J. Appel,
d-ro J. van D. Strydom, F.M. Woolf.

ENHAVOJ

Jubilea Simbolo Konkurso	1
Estraro kaj Enhavo	2
El Raporto de UNESKO	3
Jarraporto de PE Grupo	4
Renkontiĝo Lapenna-Maertens	5
Ceĥa Vojaĝisto en Sudafriko	6
Interesa Vizitanto	7
Rilate artefaritan Pluvon	8
Pri la Propagando de Nia Lingvo	9
El la Historio de la Poŝtmarkoj	10
Recenzo kaj Libro-artikolo	11
Venteraĵoj	12
Tra la Mondo	13
El Ezopa Saĝo	14
Deziras Korespondi	15
El Nia Gramatiko	16

EL RAPORTO DE UNESKO

Per dika dokumento "UNESKO 1979-1980: Raporto de la Generala Direktoro", ni povas sciigi pri kelkaj por ni interesaj aferoj.

La dujara regula buĝeto 1979-80 estis 305,3 milionoj da usonaj dolaroj. El tiu sumo 6,4% estis uzita por "Konferenca, Lingva kaj Dokumenta Servoj", 9,0% por "Kulturo kaj Komunikado" dum edukado konsumis 19% kaj naturscienco 4,9%. Aliflanke, 53,4% de la buĝeto estis por la salajroj.

Per tiuj ciferoj ni ne povas scii la veran koston por la lingva servo. Laŭ dokumento de UN, "Raporto pri la sekvoj de aldono de lingvoj en la UN-sistemo", UNESKO en 1976 konsumis 11% de la regula buĝeto por la lingva servaro.

Ekde 1977 la servoj por la araba kaj ĉina lingvoj kreskis. Do, certe devas esti pli alta elcentaĵo ol 11.

En la jaro 1979 la nombro de la tradukitaj paĝoj (unu norma paĝo: 320 vortoj aŭ 2 000 signoj) estis 95 137.

Estas notende, ke en tiu jaro UNESKO NE HAVIS GENERALAN KONFERENCON.

En la jaro 1980 la nombro de la tradukitaj paĝoj estis 102968. TIUJARE ĈESTIS GENERALAN KONFERENCON 2112 homoj - nombro komparebla al tiu de la partoprenantoj de nia universala kongreso, KIE NORMALE OKAZAS NENIA TRADUKO DE LA KONGRESAJ PAPERĜOJ.

La lingvajn kursojn por oficistoj partoprenis laŭlingve la jenaj nombroj de homoj:

	<u>1979</u>	<u>1980</u>
angla	150	139
hispana	94	127
franca	62	83
araba	43	60
rusa	43	40
ĉina	21	23

En tio ni povas vidi la malkreskon por la angla kaj la rusa lingvoj kaj la kreskon por la hispana, franca, araba kaj ĉina lingvoj.

Se nur la homaro havus unu komunan lingvon ... !

JARRAPORTO DE LA
PORT-ELIZABETA GRUPO

Kvankam nemultaj, niaj klubanoj, kiel dum la pasintaj jaroj, kelkfoje kunvenis aktive kaj vivoplene dum 1981. La celoj por 1981-82 estas tralabori kelkajn lernolibrojn kiel ankaŭ multajn aliajn, por ke pligrandiĝu niaj vortprovizo, gramatiko, stilo kaj parolkapablo. Unu nova lernanto aliĝis al la grupo ĉe la antaŭa kunveno, s-ro Keith van Eyssen, tre lerta junulo kiu antaŭe komencis lerni Esperanton pere de s-ro Peter Vos. Li estas entuziasma samideano. La PEK-anoj salutas kaj tre dankas la estraron de SEA kaj la redakcion de Bona Espero pro ilia vigla laboro por la Esperanto-movado en Sudafriko.

(S-ino) Adele Fouche,
Sekretariino,
PE Esp. Klubo.

* * * * *

FORTIGAS ARABLINGVO ĈE UN: Laŭ dokumento de UN, kiun sendis al la oficejo s-ro Tonkin, la Kvina Komitato, t.e. unu el la konstantaj komitatoj de la Generala Asembleo de la Unuiĝinta Naciaro, aprobis la elspezon de preskaŭ dek milionoj da usonaj dolaroj por la arablingva servo en UN por la buĝeta dujara periodo 1982-83. Tio povas signifi, ke la arablingva servo survojas al kompleta servo. En la jaro 1977 limigita lingvo-servo en UN kostis proksimume tri milionojn da dolaroj por du jaroj, kaj kompleta servo kostis - por eŭropa lingvo - preskaŭ naŭ milionojn. Kaj laŭ tiama takso, por ne-eŭropa lingvo, la kompleta servo kostus dek unu milionojn da dolaroj. Tial, ni rajtas konkludi, ke la pozicio de la araba lingvo en UN efektive altiĝas, eĉ se ni konsideras la altiĝintan sumon de la tuta buĝeto.

NOVJORKO: Estiĝis 92 japanaj Amikoj de la Novjorka Oficejo de UEA. Responde al la alvoko de la tri japanaj komitatanoj, 92 el la japanaj individuaj membroj pagis por la agado de la novjorka oficejo entute 714 025 gld. El la 92 personoj, 16 iĝis Patronaj Amikoj, 25 Subtenantaj Amikoj kaj la ceteraj, Amikoj. **

La 1-an de aprilo 1982 renkontigis la prezidento de la Provizora Plenumkomitato de ICNEM, Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj la prezidento de UEA, S-ro G. Maertens. Dum plurhora amika konversacio ili pritraktis la tutan situacion en la nuntempa Esperanto-movado, speciale en ligo kun la alproksimiĝanta 100-jara datreveno de Esperanto en 1987, kaj interkonsentis:

Por bone antaŭprepari ĉiujn agadojn por la jubilea jaro 1987 estos formita sendependa, kupola INTERNACIA ORGANIZA KOMITATO, konsistanta el reprezentantoj de ĉiuj internaciaj Esperanto-organizaĵoj kaj instancoj/institucioj uzantaj la internacian lingvon. La PATRONA KOMITATO por la jubilea jaro devos konsisti el mondkonataj, plej elstaraj personecoj de la publika vivo de diversaj landoj simile al la Patrona Komitato por la Zamenhof-Jaro en 1959. Estos establita aparta OFICEJO POR LA JUBILEA JARO kun konstantaj kunlaborantoj. Prof. Lapenna atentigas, ke tia organiza strukturo estas konforma al lia originala propono, publikigita en *Horizonto*, 3/81.

La unua kunveno de la reprezentantoj de la ĉefaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj por pritrakti la bazajn, organizajn programojn kaj aliajn demandojn rilate la Jubilean Jaron okazos en Münster (FR Germanio) dimanĉon, la 30an de majo 1982, laŭ aparta tagordo.

Ambaŭ esperas, ke tiu utila renkontigo signas la unuan paŝon por efika laŭplana kunlaboro en la kadro de IOK por la jubilea jaro 1987, kies fundamenta celo estas ne nur prezenti la atingojn de Esperanto kaj emfazi la unikecon de tiu kultura evento, sed samtempe ankaŭ konsiderinde disvastigi la lingvon kaj, paralele, ĝian utiligon en internacia komunikado.

Pri la renkontigo Prof. Lapenna publikigos informon en *Horizonto* kaj s-ro Maertens en la revuo *Esperanto*.

(ICNEM = Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado).

(Sendis tiun-ĉi cirkuleron, datitan la 13an de aprilo, la sekretario de ICNEM, s-ro P.Bo Larsen).

Antaŭ 80 jaroj mortis konata ceĥa esplorvojaĝisto, d-ro Emil Holub. Li naskiĝis la 7an de oktobro 1847 en Holicce. Lia sonĝo estis traveturi tutan Afrikon de la sudo ĝis la nordo. Pro diversaj malhelpoj tiun ĉi planon li ne sukcesis efektiviĝi. Antaŭ ol li unue ekvojaĝis li laboris kiel kuracisto por gajni monon por siaj vojaĝelspezoj. Li kuracis precipe diamantministojn ĉirkaŭ Kimberley.

Lia unua vojaĝo daŭris 7 jarojn; li ekvojaĝis el Port-Elizabetho kaj finis ĉe Viktoria akvofaloj. El ĉi tiu vojo li alportis multe da trofeoj el kiuj li aranĝis ekspozicion en Kimberley. Lia esplora revo estis tiel granda, ke li entreprenis duan vojaĝon. Dum tiu ĉi akompanis lin lia edzino, kiu ĉion bone kaj kurage elsuferis. Pri tiu ĉi vojaĝo d-ro Holub ne sukcesis bone, kontraŭe, tre tragike. Kiam la vojaĝantoj atingis 850 kilometrojn post Viktoria akvofaloj, la indiĝenoj perfidis ilin kaj atakis ilian tendaron, detruis ĝin kaj ĉion forrabis. La vojaĝantoj devis forkuri sen iaj provizoj kaj post terura tempodaŭro ili atingis helpon. Ĉi tiu vojaĝo daŭris du jarojn.

D-ro Holub estis en teritorioj kie eĉ d-ro Livingstone ne estis. Li difinis geografiajn situojn de cent lokoj, faris meteorologiajn observadojn, priskribis detale floraron, faŭnon kaj nekonatajn tribojn. La vivo de d-ro Holub estis mallonga sed fruktora. Lia kolektista agado estas la unua el inter afrikaj vojaĝistoj. Ĉi tion pritaksis eĉ Charles Darwin. D-ro Holub estis nobla humanisto, laborema kaj energia homo. Li mortis en materia mizero, la 21an de februaro 1902 en Vieno.

Sifron ES.

PROMESUFICE

Multaj forgesas,
ke promes'plenumiĝu.
Ili promesas
pensante: Sufiĉu!

* * * *

(El PLUK, de Poul Thorsen).

INTERESA VIZITANTO

Casisto, lingvisto, mond-vojaĝanto kaj Esperantisto dum pli ol 50 jaroj - tia estas Frans van Dooren, antaŭnelonge vizitanto el Antverpeno al Sudafriko.

S-ro van Dooren kaj lia edzino jam vizitis tiun-ĉi landon kaj Sudokcident-afrikon jam multfoje, sed estis nur dum la pasinta jaro, ke ili la unuan fojon vizitis la Kabon, tamen bedaŭrinde ne sukcesis konatiĝi kun la Kaburba Rondo. Dum ĉi-jara januaro ili alvenis en Paarl kaj gastis ĉe amikoj tie, kiuj afable invitis mian edzinon kaj min pasigi iom da tempo kun ili. Ni veturis al belega, malnova domo apud la Drakenstein Montoj, kie ni ĝuegis kelkajn tre feliĉajn tagojn, ankaŭ kun iu amikino kiu akompanis ilin al Sudafriko.

S-ro van Dooren parolas Esperanton tiel flue kiel sian hejmlingvon, la flandran, kaj egale la anglan kaj la afrikansan, sed lia edzino kaj ilia amikino parolas la anglan kaj Esperanton nur malmulte, tamen ili kaj mia edzino babilis tre feliĉe en la afrikansa kaj la germana. Iu, kiu hazarde aŭskultis nian vervan klaĉadon, estus tute konfuzita, ĉar la konversacio saltis tien kaj reen inter la angla, Esperanto, la afrikansa, la germana kaj eĉ iom de la franca, kiun mi parolis kun la amikino!

Kiel juna viro s-ro van Dooren korespondis esperante kun junulino en Leningrado kaj perletere ili fariĝis bonaj amikoj. Venis la milito, ĉesis la korespondado. Kelkajn jarojn poste li denove interesiĝis pri Esperanto kaj akiris kiel korespondanton iun majoron en la rusa armeo. Laŭtempe s-ro van Dooren, nun edziĝinta, iris Moskvon kaj sukcesis aranĝi viziton al Leningrado. Telefonante la lokan grupon li sciigis, ke dank'al la majoro, oni ne nur atendis sed ankaŭ invitis ilin al bankedo kaj balo por festi la naskiĝtagon de Zamenhof. Dum la festado s-ro van Dooren rakontis al sia gastiganto pri sia korespondantino de antaŭ multaj jaroj, kaj ke ŝia nomo estas ... (kaj li donis ĝin). Tiu respondis: "Venu kun mi", kaj li kondukis s-ron van Dooren al mezaĝa sinjorino - kaj la du korespondamikoj, post la forpaso de 35 jaroj, renkontiĝis. Tri tagojn post nia vizito ges. van Dooren reiris al Eŭropo, sed se ili revizitos la Kabon, ni klopodos aranĝi kunsidon kun lokaj esperantistoj. - J. O'C. O'Shea.

La ĉefa problemo de Israelo estas kaj restos tiu de akvo. Israelo jam de longe sukcesis pligrandigi la pluvokvanton, semante kristalojn de arĝentklorido de aviadiloj. La pluvokvanto pligrandiĝis tiutempe je 10%. La principo de tiu problemo baziĝas sur la fakto, ke nuboj ne sufiĉas por doni la deziritan pluvon. La nuboj estas kondensita vaporo, kiuj ŝanĝiĝas en gutojn da akvo, se ĝikontaktiĝas kun glacia kerno. Ĉar en la varma israela aero malofte troviĝas kristaloj glaciaj kaj ofte la nuboj eĉ gravedaj per akvo trapasa Israelon, ne donante pluvon, oni nun helpas al la kreado de gutoj per disĵetado de malgrandaj kristaloj de arĝentklorido. Tamen, tiu metodo ĝis nun uzata, estas tro multekosta.

Lastatempe oni sciigis pri nova eltrovaĵo en tiu direkto. Sciencistoj en Usono rimarkis, ke sur iuj arbustoj kristaliĝas glacio pli ofte ol sur aliaj kreskaĵoj. Oni komencis esplori la aferon kaj trovis, ke sur tiuj arbustoj troviĝas iu speciala bakterio, kiu kaŭzas kristaliĝon de glacio. Tiu simpla fakto donis al la sciencistoj la penson: Ĉu ne estas eble uzi tiun fakton por pligrandigi la pluvkvanton en Israelo uzante bakterion anstataŭ kemiaj substancoj. Laŭkoste, la diferenco estas granda. Tunojn da arĝentklorido oni povas anstataŭigi per malgranda glaŝeto da bakterioj. La prezo de tiu metodo estos pli malmultekosta kaj oni jam provis uzi tiun bakterion por kondensi la vaporon je gutoj en laboratorio. Nun oni atendas nur la pruvon en veraj nuboj. Oni informos pli la rezultoj pli poste.

* * * * *

Letero al la Redakcio.

PRI LA PROPAGANDO DE NIA LINGVO.

Ciam kiam ni propagandas nian lingvon, ni komencas per la vortoj, ke E-o, kvankam inventita lingvo estas, kompare kun naturaj lingvoj, tre facila lernebla kaj parolebla, ke sufiĉas nur kelkaj monatoj por lerni legi kaj skribi senerare, legi kaj paroli libere. Ni aldonas, plue, ke nia lingvo estas disvastigita en la tuta mondo, ke ekzistas multe da E-o libroj, gazetoj kaj internaciaj revuoj,

Ĉiuj veraj faktoj kontribuantaj kaj konvinkigaj al 9 komencantoj lerni la lingvon. Tamen, oni devas ne troigi, ĉar la kursanoj, fininte la elementan kaj dezir- anteparoli kaj korespondi konstatas, ke ili ne estas kapablaj tion fari. Rezultas, ka parto de ili ĉesas viziti la kursojn kaj forlasas la Movadon.

Jen la kaŭzo miaopinie por la nesufiĉaj rezultoj pres- kaŭ ĉie kaj la nesufiĉa nombro de aliĝintoj al la mov- ado. Ĝi dependas ne nur sur karaktero, fervoro kaj sindonemo, sed ĉefe sur la maniero de la propagando. Ni deklaru antaŭ la komencantoj, ke la lingvo estas vere facile lernebla, tamen post la kursoj oni devas daŭre lerni kaj korespondi kun eksterlandanoj kaj tio povas daŭri ne nur monatojn, sed jarojn. Jen la vero. Pri la interna ideo de E-o dum nia tempo kaj epoko oni devas paroli malpli, tamen oni devas substreki, ke la internaciaj kongresoj, la internacia korespondado, di- versaj internaciaj renkontiĝoj, ekskursoj alproksim- igas esperantistojn de diversaj landoj kaj popoloj. Se ni tiel propagandos kaj instruos, ni pli rapide at- ingos nian celon.

- El Israela Esperantisto
ensendis d-ro D. Sor.

* * * * *

Grandnombroj da afrikaj nigruloj ne deziras esti anoj de eŭropaj eklezioj sed preferas fondi siajn proprajn ekleziojn - fakte centojn da ili - kies doktrinoj ofte estas miksaĵo de la bibliaj instruoj kaj eroj de la pra- patra idolkulto. Pro malsamaj kulturoj kaj vivmanieroj la nomoj de kelkaj nigrulaj eklezioj ofte estas sufiĉe amuzaj por alipopolanoj, malgraŭ tio, ke ĉe la nigruloj mem tio estas tre serioza afero ... Unu tia eklezio havas la anglan nomon "The African Castor Oil Church of the Dead" (La Afrika Ricinolea Eklezio de la Mortin- toj).

(El libro de la angla verkisto Anthony Jacob, kiu post la dua mondmilito diversloke loĝis en Afriko kaj verkis pri siaj spertoj).

* * * * *

S-ro Dirk Rosseau, sur bieno apud Ottosdal (Kablando) aĉetis tirveturilon. Post ĉirkaŭ tri jaroj unu el la malantaŭaj radringoj la unuan fojon moliĝis. Kiam oni ellasis la akvon - kiu estis enpumpita por ke la veturilo havu pli da pezo, speciale sur plugkampoj - maldika, malgranda serpento, longa ĉirkaŭ 23 cm elvenis el la tubo, kaj ŝajnis senti sin tre hejme en la akvo. Kiamaniere ĝi eniris la radon kaj sin vivtenis tie estis mistero. Ĝi poste ricevis botelon da akvo kiel sian novan hejmon!

Oni ankoraŭ rakontas, ke Idi Amin, la Uganda diktatoro, dum la Yom Kipura milito, telegrafis al s-ino Golda Meir de Israelo, ke ŝi rapide enpaku siajn kalsonojn kaj minijupojn kaj fuĝu usonen antaŭ ol alvenos Idi Amin kaj lia sentima armeo por helpi al siaj arabaj fratoj ... Nigrulo el urbeto apud Kaburbo skribis leteron al la loka gazetaro, ke la pavianoj de la proksima sovaĝbestejo havas pli da cerbo ol Amin, kaj cetere estas pli belaspektaj. Li daŭrigis, ke se Amin ne loĝus en senadresa arbo plaĉus al li persone skribi al li!

En Britujo oni nuntempe strangmaniere kavalirigas homojn. Iu s-ro Walter Cousins, kiu seninterrompe dum multaj jaroj liveris lakton al la ĉefministra hejmo nun rajtas nomi sin Sir Walter Cousins. Laŭ ĵurnaloj la reĝina ĵokeo iam pasintece ankaŭ estis kavalirigita.

En la centra hinduja ŝtato Madhya Pradesh kaj eble frue en 1980 - pere de hinduisma pastro - 180 paroj, kiuj aĝis ek de ses monatoj ĝis kvin jaroj amase geedziĝis en templo. Bedaŭrinde nenio estis menciita pri la mielmonataranĝoj!

Naŭ monatojn post la unua "pac-vizito" de la mortinta Anwar Sadat al Israelujo okazis vera naskiĝ-inundo. Multloke ĉiu tria ino gravediĝis el kiuj multaj antaŭ jaroj decidis ne plu naski infanojn. La klarigo estas psikologia. Post 30 jaroj da preskaŭ konstanta milito, la loĝantoj povis esperi je iuspeca paco. Ĉe la akuŝejoj ofte okazis ĥaoso ĉar oni antaŭe ne estis preta por io tia!

(El diversaj gazetoj ensendis s-ro E.S. Venter).

ESPERANTO-LIBROJ EN LA
PRETORIA BIBLIOTEKO

En artikolo en BE de oktobro 1980 mi memorigis la legantojn pri la listo en BE de Aŭgusto 1978 de 63 libroj, kiuj troviĝas en la urba biblioteko Johannesburga. En la sama artikolo mi enlistigis 25 Esperantajojn, kiujn s-ro Semmelink donacis al la urba biblioteko de Pretoria, kaj kiuj troviĝas sur la teretaĝo sub la numero 499,992. Mi volas aldoni la jenajn titolojn al la listo:

- MALMGREN, Margareta: Preĝo SOS kaj Sekureco (tradukita el la sveda, 20 p.)
- NAVIJIN, I.F: Kiso de la Reĝino (elrusigis D. Staritzky, 188 p.)
- SLONIMSKI, Antoni: Mia vojaĝo en Sovetio (elpoligis S. Grenkamp-Kornfeld, 142 p.)
- WAAGENAAR, Sam: Infanoj ne Konas Limojn (tradukita el la nederlanda, teksto 32 p., bildoj 111 p.)
- ESPERANTO EN MODERNA VIVO (142 p.) Internacia konferenco. Raportoj kaj konkludoj. Paris, 1937.05.14 ĝis 17.
- LA JUNA VIVO, 1934-35 (196 p.)
- LA TURO PRI HONORO AL LA FLANDRAJ HEROOJ EN DIKSMUDE, (16 p.)
- TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE BRAZILO (151 p.)

Mi prunteprenis kaj legis ĉiujn Esperantajn librojn haveblajn ĉe la JHBA kaj PTA bibliotekoj, kaj ŝokis min vidi, ke legantoj preskaŭ tute ne prunteprenas ilin. Se ni, la Esperantistoj, ne montras intereson pri la libroj, kiel ni ekspektu la bibliotekojn kaj la ĝeneralan publikon fari tion?

RECENZO. Jus aperis nova bild-strirakonto "Nudpieda Gen" de Nakazawa Keizi. Ĝin eljapanigis Izumi Yokio kaj eldonis Ĉijare Rondo Gen, Tokio. La libro estas belaspekta, fortike broŝurita, enhavas 284 paĝojn. La nigraj/blankaj bildoj estas klare primaj, lingvaĵo facile komprenebla, eĉ por komencanto. Tamen, kiel diras Rondo Gen mem, la verko ne estas nura infanliteraturaĵo. Temas pri la suferegoj de Hiroŝima familio en Aŭgusto en 1945 kiam falis LA bombo. La prezo ĉe UEA estas 27 guldenoj. Oni povas mendi ĉe nia kontisto, s-ro C.S. Beckford.

(Ensendis s-ro O. Sher).

Okazis en la komenco de la 19a jarcento. Tra Anglujo ruliĝis radoj de poŝtveturilo. Krom homoj la veturilo transportis ankaŭ kelkajn sakojn de poŝtaĵoj. La veturilo proksimiĝis al malgranda urbo kaj ĉiuj, eĉ la ĉevaloj, jam ĝojis pri la paŭzo en la loka gastejo. Inter la homoj estis juna viro, Rowland Hill. Ĉi tie li travivis momenton kiu garantiis al li eternan famon.

Ricevo de letero tiutempe estis sufiĉe multekosta afero, ĉar pagi devis tiu, kiu ricevis la leteron. Ofte okazis ke iuj eĉ rifuzis akcepti la leterojn pro la alta prezo. Inter la homoj s-ro Hill vidis knabinon, kiu senpacience atendis la veturilon. La poŝtisto donis al ŝi leteron kaj postulis pagon. Sed la knabino ruĝiĝis kaj kun rideto redonis la leteron al la poŝtisto. S-ro Hill, volante helpi, pagis la sumon al la poŝtisto kaj transdonis la leteron al la knabino. Eĉ ne pensante danki lin, ŝi kolere rigardis lin en la okulojn, kaj poste klarigis al li la aferon. Sia frato, kiu loĝas en fora loko, sendis al ŝi la leteron, kaj ĝia nura alveno signifis, ke li fartas bone. Ĉar la knabino ne povis pagi, la letero iris reen al la frato. Laŭ interkonsento inter ili tio signifis, ka ankaŭ la fratino fartas bone. Do la poŝto transportadis informojn tien kaj reen tute senpage.

S-ro Hill pripensis la aferon kaj proponis al la Poŝto de Anglujo postuli antaŭpagon por la transportado de leteroj, kaj signi tiujn per iu speco de glumarko. Oni aranĝis konkurson pri la plej bona glumarko. Venis 300 proponoj sed gajnis tiu de Hill, kiu desegnis la kapon de reĝino Viktoria.

Kaj la 6an de Majo 1840 aperis la unuaj poŝtmarkoj. Do historia dato por la filatelistoj.

* * *

En Anglujo estas fremdlingvaj respondeculoj sendependaj de la registaro. Ili libere elektas inter lingvoj instruotaj. Neniu el ili scipovas Esperanton, do ili ne konsideras ĝin. Samtempe ili konscias, ke la instruado de fremdlingvoj ne estas populara en Anglujo. Pli ol 60% de la brita gelernantaro finlernas fremdlingvon nur post du jaroj, t.e., en sia 13a jaraĝo. El tiuj, kiuj daŭre studas ĝin, la plejmulto malsukcesas.

CEĤOSLOVAKIO: Dum 1981 aliĝis al Asocio de Esperantistoj en Slovakio 204 novaj membroj. Post vasta informado (radio, gazetaro, afiŝoj kaj kinejoj) kvar Esperanto-kursoj estis malfermitaj en Prerov.

CINIO: Funkcias du korespondaj lernejoj pri la Internacia Lingvo. Unu el ili havas pli ol 20 000 gelernantoj. Post preskaŭ 50 jaroj denove estas Esperanto-asocio en la provinco Yunnan. Cine Esperanto-eldonejo fondiĝis en Pekino lastan januaron.

DANLANDO: La Dana Esperanto-asocio jam de pluraj jaroj estas membro-organizaĵo de la dana UN-Asocio. Dum ties ĝenerala kunveno en 1980 oni voĉdonis favore por Esperanto en rezolucio pri Esperanto-instruado.

GERMANIO: Nun jam la tria restoracio en Paderborn havas menu-karton en la germana kaj Esperanto. Lastan novembro prof. H. Frank transdonis la novan menu-karton al la estro de Gutshof.

HISPANIO: Post la sukcesa Hispana Esperanto-Kongreso en Murcia lastjare oni starigis tri novajn Esperanto-grupojn en Murcia, Kartageno kaj Alquerias. Dezirante helpi kaj informi esperantistojn kiuj ĉeestos la Mondan Futbalan Campionecon, la Barcelona Esperanto-Centro fondis apartan oficejon por tiu celo.

JAPANIO: Rondo Harmonio organizis Esperanto-kursojn en 23 japanaj urboj.

JUGOSLAVIO: Okaze de la 800-cent jara jubileo de la urbo kaj omaĝe al la Zamenhofa Tago okazis lastan decembron en Varadin ekspozicio pri esperanta literaturo.

KUBO: Du jarojn post sia fondiĝo Kubo E.-Asocio jam havas ĉirkaŭ 1 400 membrojn. En la lando okazas amasaj E.-kursoj kun centoj da partoprenantoj.

KANADO: Post artikolo en loka ĵurnalo en Toronto, 300 personoj petis la unuan lecionon de senpaga koresponda kurso de Esperanto. Tiel grandan interesigon oni neniel atendis, kaj oni ne memoras, ke io simila antaŭe okazis en Kanado.

LA LEPORO KAJ LA TESTUDO

Nomis la leporo moke
 la testudon pigra, lama.
 Tiu kriis: "Ej! Aroge
 vantas vi, kuristo fama,
 tamen, se ni kuras vete,
 mi vin certe venki povus".
 "Buŝe! - diris mokridete
 la leporo - "Ĉu ni provus?"

"Jes!" konsentis la testudo,
 ili do la provon faris.
 La spektaklon de la vetludo
 multaj bestoj ĉirkaŭstaris.
 Vulp'aranĝis la aferon:
 Ĝi de arb'ĝis alta fosto
 signis rektan karieron,
 signis starton per la vosto.

La testudo sciis certe,
 ke per kruroj sen elasto
 ne galopas ĝi tre lerte,
 do ekiris sen prokrasto.

La leporo firme fidis
 je la granda krur-facilo,
 do ĝi tute ne rapidis,
 eĉ ekdormis en trankvilo.

Ĝi vekigis ... hop ... ekkrie
 la aeron sage fendis,
 estis jam en cel! Sed tie
 la testudo ĝin atendis.

LA VULPO KAJ LA MASKO

La vulp'surkampe maskon trovis,
 ĝin ĉiufanken turnis, ŝovis,
 kaj diris kun rikan'acerba:
 "Tre bela kapo, sed sencerba".

* * * *

(El Ezopa Saĝo, de K. Kalocsay).

S-ino Elena Kovačeva, 5400 GABROVO, Str. T. Burmov 13, BULGARIO serĉas plumamikojn en iu ajn afrika lando.

S-ro Tage Tallquist, Grondalneagen 172, S-117 46 STOCKHOLM, SVEDUJO volas korespondi kun geamikoj en kiu ajn lando, pri ĉiuj temoj.

Estimata Asocio en Sudafriko,
Mi estas 14-jara knabino kaj jam longe mi serĉas amikinojn el via lando. Ĉu vi al mi helpos? Antaŭe mi dankas.
Mia adreso: Jitka DAJČAROVA, Kocianov 68, LOUČNA N.1d, 788 11, o. SUMPERK, Ĉeĥoslovakio.

Karaj amikoj,
Mi skribas al vi kiel komencanto en Esperanto. Unue, mi deziras kun iu en Sudafriko korespondi. Due, en mia urbo en Septembro ni havos unusemajnan ekspozicion pri Esperanto kaj mi aprezus iom da literaturo kaj leteroj de via grupo kaj de aliaj en via lando. Mi apartenas al malgranda, loka grupo. Sincere via, John High, Esq., 19, Weddell Rd., Haverhill, Suffolk, CB 9 OLE, Anglujo.

Halina Wołczyk, 26 Marca 27/31, 44-300 Wodzisław, Pollando deziras korespondi kun sudafrika virino. Ŝi estas 44-jara kaj havas 11-jaran filinon. Ŝiaj kruroj estas paralizitaj kaj ŝi estas ekonomistino.

Al Sudafrika Esperanto-Asocio:

Hodiaŭ mi trovis vian adreson en Japana Esperanto-gazeto. Mi estas 34-jara oficistino en Japanujo kaj antaŭ nelonge komencis lerni Esperanton. Mi havas intereson en la vivmanieroj en via lando kaj deziras korespondi tiurilate kun geamikoj. Mituko Okubo, 2-9-8- Shinmachi Isujido, Fujisawa-shi Kanagawa-Ken 251, JAPANUJO. Mi atendas vian respondon kaj restas, tute via, Mitsuko Okubo. **

Oni devas esti nek astronauto, nek japano por konsciiĝi, ke ni vivas meze en la komputilo-epoko. Kiam ĝi komenciĝis, mi ne scias, ĉar ĉio okazis tiel rapide. Nun ni havas komputilojn por ĉio. Ili liveras veterprognozojn kaj kontrolas niajn tolaĵlistojn. Estas plej mirinde, ke ili pli kaj pli malgraŭiĝas. Se tiu tendenco daŭros, ili baldaŭ povos tute malaperi. Sed povus same okazi, ke ankaŭ ni malaperos.

Efraim Kiĝon.

EL NIA GRAMATIKO

PRI KUNMETITA PASIVA VERBO: La formoj "amatas, amitas" anstataŭ " estas amata, estas amita" per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Akademio volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia PROPRA iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo se -as, -is, ktp. signifus "estas, estis"; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verboj finaĵoj eble ricevos la signifon de la verbo "esti", tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon NE havas.

PRI "FARTI": Ĉar la vorto "farti" estas tre malagrabla por la anglaj oreloj, tial mi konsilas, ke anstataŭ ĝi ni uzadu (precipe en Anglujo) la vorton "stati", kiu troviĝas en la Universala Vortaro kaj povas tute bone anstataŭi la malagrablan vorton. Ekzemple: "Kiel vi statas" anstataŭ "kiel vi fartas". En la okazo, se la senco povas esti ne tute klara, oni povas ankaŭ uzi la pli precizan vorton "sanstati".

PRI LA DIVIDO DE LA VORTOJ EN LA SKRIBO: Transportante la vortojn el unu linio en la sekvantan, ni ordinare divididas ilin per iliaj gramatikaj partoj, ĉar ĉiu parto gramatika en nia lingvo prezentas apartan vorton. Tiel ni ekzemple divididas: Esper-anto, ricev-ita, ktp. Sed tiu ĉi tute ne estas deviga regulo; ni faras ĝin nur por ne rompi subite kun la kutimoj de aliaj lingvoj; efektive tiu ĉi maniero havas nenian celon kaj signifon, ĉar la transportado de la vortoj estas afero tute papera, havanta nenion komunan kun la leĝoj de la lingvo; ni konsilas al vi per nenio vin ĝeni en la dividado de la vortoj kaj fari ĝin tute tiel, kiel en la donita okazo estos al vi pli oportune. Eĉ se vi divididos ekzemple "aparteni-s", ni vidus en tio ĉi nenion malregulan, kvankam la aliaj lingvoj (tute sen ia logika kaŭzo) ne permesas tian dividadon.

* * * * *